

## **La 13an de novembro 2013**

### **Kiel fartas homoj en Fukuŝima?**

Antaŭ ne longe mi ricevis telefonvokon de s-ino H, kiu petis min pruntedoni monon al ŝi. Antaŭ la katastrofo ŝi loĝis en la vilaĝo Tooni en la urbo Kamaiŝi en la gubernio Iŭate kun sufiĉe da enspezo, sed ŝia domo estis perdita en la cunamo kaj ŝi kaj ŝia edzo perdis fiŝkaptan laboron. Ŝia filo fariĝis mense malsana pro la ŝoko de la cunamo. Konsiderante la sanstaton de la filo, ili decidis translokiĝi al la urbo Morioka, la ĉefurbo de la gubernio Iŭate, por komenci novan vivon. Sed la vivo en Morioka ne estas tiel glata, kiel ili antaŭvidis. Lia edzo komencis labori en iu kompanio, sed la salajro ne estas sufiĉe alta por kovri la elspezon. Ankaŭ ŝi komencis labori, sed ŝi ne povis adaptiĝi al la laborejo kaj baldaŭ eksiĝis. Ŝia filo eniris en privatan superan mezlernejon en 2012, sed ankaŭ li ne bone adaptiĝis kaj nun li ne povas viziti la lernejon.

Mi supozas, ke tuj post la katastrofo suferantoj havis ŝparitan monon, sed nun, 2 jarojn kaj 8 monatojn poste, ili preskaŭ eluzis tiun monon, tamen ankoraŭ ne povas havi esperon en sia estonteco, do alfrontas pli da malfacilo. Hodiaŭ mi skribos pri la stato de suferantoj en Fukuŝima, kiuj havas pli malfacilan vivon pro la nuklea akcidento.

### **Molestado al infanoj kreskas**

En la tuta Japanio molestado al infanoj atingis 66807 en 2012, sed precipe granda estis la kresko en Fukuŝima.

Fukuŝima: 311 molestadoj (52 pli multe ol en 2011)

S-ro Toono Kaoru, kiu helpas solajn patrinojn, analizas la situacion jene :

« Ne malmultaj homoj perdis esperon pro la katastrofo, kaj troviĝas solaj patrinoj loĝantaj en provizora domo, kiuj forĵetas respondecon varti siajn infanojn ».

S-ro Kanbe Ŝiniĉi laboranta por tiuj infanoj en la gubernio Fukuŝima diras: « Gepatroj, kiuj molestas siajn infanojn, jam de antaŭe vivis en malharmonio aŭ izolite loĝis. Streso kaj maltrankvilo kaŭzita de la

katastrofo kaj la nuklea akcidento plu puŝas ilin al molestado al siaj infanoj. Certe estas pli da tiaj neraportitaj gepatroj ».

(la ĵurnalo Mainiĉi. La 28an de julio 2013)

### **Sporta kapablo de gelernantoj malaltiĝis**

La gubenrio Fukuŝima publikigis la rezulton de la enekto pri korpa forteco kaj sporta kapablo de gelernantoj. Laŭ ĝi, precipe la nivelo de lernantoj malboniĝis. Prof. Ogaŭa Hiroŝi de la Universitato Fukuŝima diris: « Malboniĝo de sporta kapablo kondukas al kutimo ne sporti, kaj sekve povos okazi dikiĝo kaj malsaniĝo ». En la gubernio oni malpermesis al infanoj ludi longe ekstere.

(la ĵurnalo Fukuŝima-Minpoo, la 13an de julio 2013)

En la infanĝardeno en la urbo Nihonmacu, Fukuŝima, troviĝas dozmetro pri radioaktiveco en sia ludejo. La cifero nun estas 0,166 mikrosivertoj (maksimuma « sekura » limo estas 0,23), sed la urbo ordonas, ke infanoj ne ludu ekstere pli ol 30 minutojn tage. La estro de la infanĝardeno diras : « Mi volas, ke infanoj povu libere ludi en la ludejo ».

(la ĵurnalo Fukuŝima-Minpoo, la 11an de julio 2013)

En la Kunveno por diskuti pri edukado post la nuklea akcidento iu instruisto raportis jene : « Lernantoj ŝajnas viglaj, sed en efektiveco ili suferas pro granda streso, vizitante provizoran lernejon kaj loĝante en provizora, malgranda domo ». Alia diris : « Perdiĝis kondiĉaro por lernantoj kreski bone kiel homo. Trovigas lernantoj, kiuj diradas : ‘Ni estas forĵetitaj, senvaloraj infanoj !’ aŭ riproĉas siajn gepatrojn, dirante: ‘Kial vi, patraĉo, ne laboras ?!’ »

(la ĵurnalo Akahata, la 29an de julio 2013)

## **Multiĝas sinmortigoj kaj “rilatantaj mortoj”**

### **Sinmortigoj**

2011: 10 sinmortigoj

2012: 13

2013 ekde januaro ĝis aŭgusto: 15

Sumo : 38 (Viroj : 24, virinoj :14)

Laŭ aĝoj: 20-29-jaraj : 5

30-39-jaraj : 2

40-49-jaraj : 1

50-59-jaraj : 12

60-69-jaraj : 7

70-79-jaraj : 3

80- : 8

S-ino Narui Kanae, psikologo, analizas jene : « Ju pli pasas pasas, des pli suferas mense rifuĝintoj pro la nuklea akcidento. Ili havas sian domon, sed ne povas reveni tien, tial ili ĉiam ŝanceliĝas, nek povante rezigni, nek povante decidi komenci novan vivon. Vidante sian domon putranta, ili sentas pli da streso. Sinmortigo povos pli multiĝi ».

### **Mortoj rilatantaj al la nuklea akcidento**

En Fukuŝima mortis 1599 homoj pro la cunamo. Ĝis nun aliaj 1459 mortoj okazis, rilatante al la nuklea akcidento. En 2011, post la katastrofo 761 mortis pro malbonaj vivkondiĉaro kaj cirkonstanco, sed la nunaj mortoj okazas pro malespero. Prof. Takagi Rjuusuke de la Universitato Iŭaki-Meisei diras: « Suferantoj vivas dum preskaŭ 2 jaroj kaj duono for de la hejmo sen perspektivo por sia estonta vivo. Tio malbone influas la suferantojn korpe kaj mense ».

En tiu situacio ankaŭ multiĝas homoj, kiuj volas eniri en malsanulejon. Sen laboro, sen hejmo kaj sen espero, multaj rapide maljuniĝas kaj malsaniĝas.

(la ĵurnalo Fukuŝima-Minpoo, la 17an de aŭgusto, la 12an de septembro kaj la 13an de oktobro 2013)

En Filipinoj okazis granda katastrofo. Tie homoj estas multe pli malriĉaj ol japanoj kaj la registaro ne estas tiel bone organizita kiel la japana, do ekestos multaj suferantoj, kiuj suferos same kiel en Fukuŝima.

Pardonon pro la malĝoja raporto, sed tio estas fakto, kiun ni devas alfronti.